

Enhavo:

1. Sciigo por la novaj membroj
2. Rekomendo de kelkaj TTT-pagxoj
3. Plia arangxo
4. Bondeziroj

1. SCIIGO AL NOVAJ MEMBROJ

Karaj samideanoj, kiuj ricevas la retkomunikojn de CxEA unuan fojon, bv. kompreni, ke estas tiel, ke ni ne havis vian retadreson. Por vi kaj ripete por la ceteraj ni klarigu, ke temas pri la servo de Cxehxa Esperanto Asocio, kiu pere de la redaktokomisiono (RK) dissendadas neregule informojn, kiujn la membroj de la RK konsideras interesaj por cxehxaj esperantistoj, sendepende, cxu ili estas membroj de CxEA aux ne. La servo estas senpaga kaj ne gxena (neniam ni aldonadas aldonajxojn, kiuj pezigus la retmesagxon), tamen se iu ne deziras ricevadi gxin, sufcixe per simpla "Re:" kaj alskribo "ne sendi" montri tion kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto, kiu nun enhavas 87 cxehxajn esperantistojn kaj 18 eksterlandajn (de najbaraj landaj asocioj kaj de kelkaj individuoj, kiuj montris intereson ricevadi gxin.

Mi ankaux ripetu, kiuj personoj kreas la redaktokomisionon: V=ECra Podhradsk=E1, CxEA-prezidantino, Petro Chrdle, CxEA-vicprezidanto, Jan =D8epa (Fidel), CxEA-vicprezidanto, Pavel Polnick=FD, CxEA-sekretario, Zden=ECK Heiser, membro de CxEA-komitato respondeca pri E-klubo, Josef Hron, membro de Revizia komisiono de CxEA, Jana Melicharkova, prezidantino de Pedagogia sekcio de CxEA kaj de Cxehxa sekcio de ILEI, Miroslav Malovec, redaktoro de Starto kaj Zden=ECK Pluha=F8, estro de la CxEA-libroservo.

2. REKOMENDOJ DE KELKAJ INTERESAJ TTT-PAGxOJ:

eble dum la festotagoj vo trovos pli da libera tempo kaj volos iom surfi tra la virtuala Esperantujo. Por tiu kazo ni rekomendas al vi kelkajn retpagxarojn, kiujn ni konsideras speciale interesaj: por koncizeco ni aldonas "http://" nur tiam, kie mankas kutimaq komenca "WWW".

Jen la rekomenditaj pagxaroj:

www.uea.org Universala Esperanto-Asocio

www.ais-sanmarino.org Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino

<http://lps.uniroma3.it/ilei> Internacia ligo de Esperanto-instruistoj

<http://lps.uniroma3.it/kler> kvazauxlernejo de Tibor Sekelj

www.edukado.net trarigardo de interesaj lerniloj por Esperanto

www.esperanto.hu Eventoj, ret-info kaj plena Esperanto-kalendaro

www.bydg.pdi.net/-turismo Monda turismo

www.kuk.cz/cea Cxehxa Esperanto-Asocio

www.clavis.cz/Starto organo de CxEA STARTO

<http://esperanto.nu/lingvo> lingva konsultejo

<http://home.wxl.nt/~lide/esperanto-adresaro> adresaro de
esperantistoj kaj de Esperanto-organihajxoj rete atingeblaj

<http://home.wxl.nt/~lide/nun> NUN - aktualaj informoj pri
Esperanto

www.komerco.com/itre Internacia Traduk-Reto pere de Esperanto

3. PLIA ARANGxO:

al la kalendaro de Esperanto-arangxoj, kiujn ni dissendis en la RK
1_3 - ni eksciis pri la jena:

2002-03-22/24 Vy=B9kov: RAVE-2 (Renkontigxo Amikeca en Vy=B9kov
Esperantista. Kontaktadreso: Josef Voj=E1=E8ek, vojacek@jumbo.ped.muni.cz

4. BONDEZIROJ

per cxi tiu lasta retkomuniko ni deziras al vi nome de Cxehxa
Esperanto-Asocio agrablan travivon de la Kristnaskaj kaj jarsxangxaj
festotagoj kaj sanon, felicxon, sukceson, kaj dauxran intereson pri
Esperanto!

Viaj redaktokomisionanoj